

La ranmarĉo

(el la libro de Charles Richet "L'homme stupide")

Traduko de Robert Molimard

Iafoje, somere, en granda ebenaĵo, sub salikoj, kuijn karesas la lastaj radioj de la subiranta suno, marĉeto movbriligas sian nemovantan akvon, en la vespera silento, kiun apenaŭ perturbas flugo de libelulo aŭ la malproksima eĥo de iu ajn anĝeluso. Se tiam, malordigante tiun serenecon, pasanto ĵetas ŝtonon meze de kanoj, subite ekiĝas senbridan bruegon. Centoj da ranoj, akvaj loĝantoj de la marĉo, eksaltas kien ajn, kun laŭteĝaj frenezaj kvakoj. Svarmo kaj bruego! Kiu malamiko, kiu fremlandano ĵus insultis nian ripozon? Malbenon! Malbenon al ĝi! Kaj kvakoj pluiĝas, koleregaj, interrompata de daŭraj silentoj.

Tian saman specon da tumulto kaŭzis la nura ideo de internacia lingvo.

Internacia lingvo! Kia frenezaĵo! Kia ĥimero! Kio! Homoj ne plu estus disigitaj de la diferenco de siaj idiomoj? Kio! Ne plu necesus gramatikoj, vortaroj, interpretantoj por komuniki pensojn? Kio! Norde kiel sude, la samaj homaj sonoj esprimus la samajn ideojn? Kio! Ĉiuj homoj povus sin interkompreni, kaj eble ne plu batali? Sed tio estas simple monstrega!

Post universala senbridigo de stultaĵoj, baldaŭ estiĝis silentego. Indigno estas anstataŭita de indiferenteco, malestimanta indiferenteco, pli danĝera ol indigno.

Tamen, se restas ankoraŭ iu ajn espero fari nian vivon malpli mizera, malpli nefirma, ĝi estas ke sama unika lingvo estus parolata, almenaŭ komprenita de ĉiuj la homaj fratoj. Ekde la Babela turo estas detruita de la ĉiela fajro, la homoj sur la tero uzadis malsamajn lingvojn. Oni akordiĝas por nomi "*gepatra lingvo*" tiun, kiun ni parolas ekde nia infanaĝo, kies sonoj ni aŭdadas ĉirkaŭ ni. Sen paroli pri mortintaj lingvoj, nun ekzistas centoj uzataj diversaj lingvoj. Ĉirkaŭ dek kvin gravas, t.e. estas parolata de pli ol dudek milionoj da homoj, la franca, angla, hispana, pola, germana, itala, portugala, rusa, greka, ĉina, japana, araba, hindustana; aliaj eble, kiuj mi forgesas. Dek kvin lingvoj estas multe, ĉar por koni iom sufiĉe nur unu nuran, kiu ne estas nia gepatra, necesas almenaŭ unu lernada jaro. Nu, tia lernado estas teda kaj netolerebla, plie homa vivo estas sufiĉe nedaŭra por ke oni ne povas rigardi unu vivjaron kiel neglektebla.

Do ekzistas alternativo. Aŭ oni parolas nur sian gepatran (tre facila solvo, kiun elektas la granda plimulto de homoj); aŭ oni perdas du, tri, tri vivjarojn por lerni unu, du, tri fremdajn lingvojn. Paroli nur la gepatran lingvon tre taŭgas por kamparano ligita ĉe lia vilaĝeto; por ministro subterigita en lia minejo; por laboristo fermita en lia metiejo. Sed ĉu komercistoj, industriistoj, marvojaĝistoj, scienculoj, artistoj, kleruloj devigus rezignacii ĉiam resti sen parolrilatoj kun homoj el aliaj landoj? Se Franco, kiu konas nur la francan lingvon, veturas Londonon, Nevjorkon aŭ Madridon, li estos kiel perdita en nova mondo, kie ĉio estos nekonita por li. Nu, oni ne povas konsili al artisto, scienculo, industriisto neniam eliri el limoj de lia lando. Do, je risko de bedaŭrinda nescio, Franco devigas paroli iomete de la angla, iomete de la hispana, de la itala, de la germana. Sed, por atingi tian neperfektan scipovon, necesas al li almenaŭ du jaroj de mafacila laboro. Jen vera granda ofero por sukcesi ĵargoni malfacile kvar fremdajn lingvojn.

Ĉio estus facila se ni povus meti apud nia gepatra lingvo (kiun estus krima neglekti) komunan lingvon, internacian lingvon. Oni proponis multajn. Ekzistas unu, kiu estas bonega. La *Esperanto*, devenanta de la latina, kreita de la genio de Zamenhofo, enhavas gramatikon

tiel simpla ke oni povas scii ĝin post unu horo. Pri vortotrezoro, ĝi estas tiel nekomplika, ke post monato oni scias la ĉefajon.

Kio gravas al homoj! Ili kvieteco estas perturbita, ili tuj, sen pripensi, trovis multajn kaj malfortajn kontraŭdirojn.

1° Internacia lingvo ne povas esti perfekta.

Certe, sed ĉu ĝi bezonas perfektecon? Ĉu niaj nunaj lingvoj estas do neriproĉeblaj? Dio! Ili estas tiel trufita de multe da nerugelaĵoj, esceptoj, nekoherecoj.

3° Necesas tempo por bone koni esperanton.

Ha yes, necesas unu lernada monato kaj tri da uzo por flue paroli ĝin. Sed pri iu ajn alia lingvo oni atingus saman rezulton nur post tri jaroj! Tri monatoj anstataŭ tri jaroj, tio gravas!

3° Ĝi estos rapide difektita, koruptita, kaj oni parolos ĝin per malsamaj prononcm manieroj.

Ne! Ĉar nenio estas pli facila ol preventi tiajn koruptaĵojn kaj starigi fiksaĵojn por akcenti. La sperto provis ke homoj el diversaj naciecoj parolas *Esperanton* kun taŭga akcento.

4° Tiel oni preventos progreson de niaj naciaj lingvoj.

Ho! Kia ĥimera timo! Malgraŭ niaj stultaj naciaj malmodestecoj, naciaj gepatraj lingvoj faras neniun gravan progreson ekstere. Ili neniam progresos: ili ne povos progresi. Iru Edimburgon, Madridon, Moskvon, Lisbonon, Kalkaton, Bonaeron, Romon, Ĉikagon, vidu ĉu la franca lingvo estas parolata de popolo. Iru kaj vidu, nur por estiĝi konvinkinta pri via ega nescio. Kaj vi konstatos ke; 1° Rilate al lingvo, nur gravas popolo; Ĉiu popolo parolas sian nacian lingvon.

Fine, kial insisti? Tiu, kiu volas respondi tiajn kontraŭdirojn estas tro naiva, ĉar ili ne estas sinceraj. Ĉiuj povas kondensiĝi per nura diro, kiu, kiel funebra sonorado, eksonas je ĉiu progreso: *Tio ne estas interesa!*

Certe, la malpli sagacaj mensoj bone komprenas ke ĉiuj popoloj povus sufiĉe facile, post dudeko jaroj, per komuna universitata strebo, krei komunan internacian lingvon kiu, sen damaĝi la karan gepetran lingvon, estiĝus la universala suplementa lingvo, parolata kaj komprenata de ĉiu, la nura, kiun estus utila lerni. Tia reformo, kiu ŝanĝus mondon, estas ebla, eĉ facila. Oni tion antaŭflaras; oni tion scias ! Sed kio! *Tio ne estas interesa!*

Jen nia senzorgeco, nia frivoleco, nia nekomprenebleco de estonteco. Jen antaŭ ĉio, ni diru, nia stulteco. Kiam temas pri granda afero, kiu inaŭgurus novan spiriton ĉe homoj, regeneradon de homaro, *Homo stultus* brue ekvekiĝas por batali kontraŭ ĝin.

Kaj, kiel aristofanaj ranoj, li kontentiĝas kriegi: "Brekekekek, kvak,kvak".